4-a Jaro. N-o 207 APERAS SEMAJNE 20. Septembro 1928



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti


SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

JE LA MEMORO DE LEO TOLSTOJ

1828 — 1928

Antaŭ cent jaroj la larĝa rusa ebenaĵo donis la vivon al unu el la plej rimarkindaj homfiguroj, kiujn iam vidis la Historio de la homaro. Antaŭ cent jaroj naskiĝis en Jasnaja Poljana Leo Nikolaeviĉ Tolstoj. Kiu ne memore prezentus al si, aŭdante la nomon, iujn bildojn, kiujn li trovis en tiu aŭ alia libro kaj gazeto? Bildojn prezentantajn tiun distingan okdekjarulon kun la serioza, sed konfidon portanta okulparo sub la dikaj hartufaj brovoj? "Tiom da boneco en la granda nazo de bona hundo, en la okuloj kiuj vin rigardas tiel senĝene, tiel klare, tiel malgaje! Ili legas tiel certe en vi[1]!" Jes, li komprenis la homojn per la tuta profundeco de sia larĝa animo, la granda forto de sia genio. Li, kiu travivis kaj proprakorpe spertis ĉiujn bonojn kaj malbonojn. Tiom da propraj mankoj, kiujn li ekatakis kaj venkis per daŭro de okdekdujara vivo! Li estis bona, brava militisto en sia junaĝo, bonfida patrioto en la Krimeaj bataloj, li havis la malvirtojn de hazard-ludanto kiel de virin-amanto. Sole unu malvirton li neniam posedis, kaj ĝin li plej akre dum sia vivo kontraŭbatalis: la mensogo. Li ardege amis la veron. Sur amo al vero kaj sur amo al malforta, mizera homo estas bazita lia tuta agado kaj predikado. Lia fido al la venko de tiu amo sur tuta tero, ĉe ĉiuj homoj, estas lia gvidilo, lia instigilo, lia diaĵo. Kaj kian potencan parolilon li disponis por ĝin vortigi! Mirinda verkotalento esprimigas lin en arte belega lingvo la profundajn pensojn, la grandan leĝon de amo kaj moralo, sur kiu kuŝas fundamente lia tuta multkolora, multtema verkaro.



Kaj la edukado! Morale forta persono havas hipnotigan kapablon je la homoj. Kaj kiom pli tiu forto hipnotiga efikas sur la infanoj! En nenia rilato mi tiom bone komprenas la celadon de Tolstoj ol en liaj pensoj pri edukado. Kiel trakti infanojn, kiel eduki ilin? Tolstoj respondas: Per amo, per la modela ekzemplo, per la propra bona faro. "Mi pensas", li diras en "Pensoj pri edukado kaj instruado[2]", ke ne nur estas malfacile, sed eĉ neeble bone eduki infanojn, se oni mem estas malbona; kaj ke la edukado de infanoj estas nur memperfektiĝado, al kio nenio tiom kunhelpas, kiel la infanoj... La tuta edukado konsistas en pli kaj pli granda konscio de siaj eraroj kaj en liberiĝo de ili." Kaj aliloke: "Por bone eduki estas necese vivi bone antaŭ tiuj, kiujn vi edukas[3]..." Kaj alian fojon: "Unu, kion oni povas aserti, estas tio, ke la bono vekas bonon en koroj de homoj kaj certe kaŭzas tiun efikon, kvankam ĝi estas nevidebla[4]."

Kaj kiom indigne li turnas sin kontraŭ la reganta klaso: "Estas terure rigardi tion, kion la riĉuloj faras pri siaj infanoj[5]..." Kaj: "Ĉiun infanon de bonhavaj klasoj per la edukado mem oni metas en staton de sentaŭgulo, kiu per malhonesta vivo devas akiri por si almenaŭ 500 sm. jare[6]."

Laŭ tio oni povus opinii, ke Tolstoj estas socialisto kaj konkorde kun la diversaj samepokaj tendencoj por renverso de la burĝa klasregado. Certe, profundkore oni devas nomi lin socialisto, kiam oni legas liajn fulme kontraŭmilitajn verkojn, ekkonas lian avidon al homa (li mem diras “dia“) vero kaj homa moraleco ... Tamen, li malestimas kaj kontraŭas akre la organizitan klasbatalon de lia tempo, li indigniĝis kontraŭ la demokratio, la “libera volo de popolo“, kaj ankaŭ kontraŭ la marksisma materialismo: “La socialismo havas kiel celon la kontentigon de plej malsuperaj bezonoj de l'homo: lia materia bonstato. Kaj tiun ĉi celon mem ĝi neeble atingi povas per la rimedoj, kiujn ĝi rekomendas[7].“ Kaj kun maldolĉa sarkasmo li parolas pri eventuala venko de l' socialismo, kiu terure aspektigus la mondon. Kaj sekvas verŝado de ironia mokado al lia fama samtempulo Ĵores' (france: Jaurès). — Kion Tolstoj dirus pri la proleta diktatoreco en Sovetio? — Malmoraleco. Ĉar li estas la plej furioza kontraŭulo de la frazo: “La celo sanktigas la rimedojn.“ Ruzaĵo, taktiko, mensogo, teror-ago ia, eĉ farata por la akcelo de plej bona ideo, — estas laŭ li neestingebla makulo, kiu malmoraligas noblan celon aspiratan. Tian instruon li tiris el la Krimea militiro, en kiu li partoprenis kiel kuraĝa, bonpatriota, eĉ heroa soldato, por eksperti la tutan trompmensogaĵon de patriotismo kaj militismo ... Li fariĝis la plej severa kaj ardanta predikanto kontraŭ la patriotismo por la paco.

Kaj eĉ optimistan noteton ni trovas en lia verketo pri “Patriotismo kaj Registaro[8]“: “La homoj ekkomencas kompreni la patriotisman trompon, en kiu la registaroj tiel fervore penadas ilin reteni.“

Ankaŭ li ja vidis praktikajn tiujn komencojn ... li sciis pri la ekzisto de esperanto, kaj ni trovas de li tre belan eldiron pri esperanto el liaj lastaj vivjaroj: “La oferoj, kiujn faros ĉiu homo de nia eŭropa mondo, por dediĉi kelkan tempon al la studo de esperanto, estas tiel malgrandaj, kaj la rezultoj, kiuj povas deveni el tio, estas tiel grandegaj, ke oni ne povas rifuzi fari tiun ĉi provon.“ Meritas tiu ĉi eldiro esti utiligata ĉiam kaj ĉiam dum nia propagando.

Certe Tolstoj estis kapabla ekkoni la valoron, kiun povus havi lingvo kiel esperanto por la pacigo de l' mondo kaj unuigo precipe de la larĝaj suferantaj amasoj. Por ili ja li donis sian tutan grandan amon, mem rezignante je riĉaĵoj; ĉar li ne povis vivi en bonstato, dum aliaj milionoj suferadas. Malgraŭ kelkaj strangaj utopioj kaj erar-juĝoj, per kiuj li malamikiĝis kun preskaŭ ĉiuj, la laboro, kiun Tolstoj faris, estas pozitiva laboro de bonkorega, amplena, je fortaj talentoj abundanta homo. Kvazaŭ la konscienco de la homoj, li agis devige etike kaj morale, modele por siaj homfratoj, kun la ununura celo: plibonigi la mondon.

N. B.

---

[1] R. Rolland, Vivo de Tolstoj (citita laŭ franca eldono). [2] Tri Verkoj de Tolstoj (aperinta ĉe SAT), pĝ. 68. [3] Ibid. pĝ. 72. [4] Ibid. pĝ. 69. [5] Ibid. pĝ. 71. [6] Ibid. pĝ. 75. [7] En letero al japano Izo-Abe, fine 1904 (citita laŭ: Rolland, Vivo de Tolstoj, pĝ. 163, franca eldono). [8] Tri Verkoj de Tolstoj (SAT), pĝ. 28.

Proverbaro Esperanta

laŭ la verko “Frazeologio rusa-pola-franca-germana“ de *M. F. Zamenhof*, aranĝis *L. L. Zamenhof*.

Unu volumo in-8, 82-paĝa

Prezo: 1,50 mk. g.

Adm. de SAT.

HODIAŬ EN BULGARIO

II

La Armeo

Tuj post la eŭropa milito, makedonanoj, kruela, kruda kaj militema popolo, kaptis kaj nun okupas la ĉefajn rangojn en la armeo kaj en la registaro. Nun ili gluiĝas al tiuj rangoj, parazitas kaj diktas al la bulgara loĝantaro. Nuntempe la bulgaroj efektive ne estas regataj de bulgaroj, sed de makedonanoj. Tiu popolo parolas bulgaran lingvon. Makedonio post la eŭropa milito, laŭ la packontrakto, estis donata al Jugoslavio. La makedonanoj postulas aŭtonomion, kaj en Bulgario ili havas naciajn organizojn por la starigo de makedonia aŭtonomio. Ĉie en Bulgario estas propagandata makedonia sento kaj nacia spirito. Ĉe la landlimo de Makedonio kaj Bulgario daŭre okazas insidmortigoj de la militaj “Komitatoj“. Antaŭ kelkaj monatoj, en Makedonio, 22-jara fraŭlino flamigita per la patriotisma propagando, mortigis per kuglo jugoslavan generalon kaj tuj memmortigis sin. Tra Makedonio kaj ĉe la patriotaj organizoj ŝi estis proklamata heroo, patrioto, sanktulo, kaj ŝia bildo estas montrata publike tra tuta Bulgario por flamigi la militdeziron en la koroj de la junularo. Pormilitaj organizoj estas ĉie permesataj kaj favorataj. Laŭ eŭropa packontrakto la armeo de Bulgario estas limigita ĝis minimumo, kaj forigita estas la deviga militservo. Tamen, ĉiu junulo devas servi al la registaro du jarojn, dum kiu tempo ili faras novajn vojojn, fervojojn ktp. Ĉar la makedonanoj volas akiri aŭtonomion per milito, ili klopodis ĉe la Ligo de Nacioj por havigi al si permeson por pli granda konstanta armeo. Tiun permeson ili ne ricevis. Tamen ili havas maskitan, sed plenan devigan militservon. Dum kontrolo de la Ligo de Nacioj la uniformoj kaj ĉiuj signoj de ekzistanta armeo estas kaŝataj, kaj post foriro de la kontrola komisiono oni laŭte ridas post ĝia dorso en Bulgario. La soldatoj denove surmetas siajn uniformojn, kaj en keloj de privataj domoj, en tuta distrikto de urboj, estas deponejo de municio. La granda eksplodo en Plovdiv dum la tertremo, kiu detruis teritorion de militista klubo kaj tutan laboristan kvartalon, sed ne tuŝis la riĉulan parton de la urbo, montras kiom oni tie obeas la ordonojn de la Ligo de Nacioj, ne havi armeon kaj municion. Propagando por granda armeo estas permesata; ĉiel estas subtenataj kluboj por militistaj celoj, kiaj “Makedonaj heroo j“ (Junak), “Suboficiraj kluboj“, “Sokol“, “Sportkluboj“ ktp. Tiaj organizoj povas libere spiri kaj agitadi, sed al laboristoj nenia organizado estas permesata.

Idealista popolo

La bulgaroj en sia amaso estas idealemaj kaj havas reton da idealistaj organizoj tra la lando. La terkulturistoj deziras pacon por laboradi trankvile. Ili estas kontraŭ la milita propagando kaj petas, ke alilandaj potencoj ne permesu al bulgara registaro pligrandigi sian armeon. “For la militon, donu al ni pli bonajn vivkondiĉojn“, estas ilia krio. Preskaŭ la tuta nova generacio apartenas al iu idealista movado. Ili estas abstinenculoj, vegetaranoj, tolstojanoj, esperantistoj, kooperativanoj ktp. Tiuj movadoj ankaŭ estas konsiderataj kiel kontraŭŝtataj, ĉar ili ne propagandas kaj ne subtenas la propagandon de militismo. Ĉiel ili estas malhelpataj. La edukada ministro malpermesas ankaŭ nian lingvon en la lernejoj, ĉar ĝi, laŭ li, estas nepatriota.

Industrio

Ne ekzistas multaj fabrikoj. Pro nesufiĉa gajno la terkulturistoj grade forlasas siajn terpartojn kaj iras en fabrikojn, kiuj ne kapablas sorbi ĉiujn laborserĉantojn. La senlaboruloj ne ricevas ŝtatan subvencion. Tamen, la kreskanta nombro da fabrikoj allogas pli kaj pli la senlaborajn kamparanojn, kio

grade kreas la urban proletaron, kiel en Eŭropo. Gabrovo, la bulgara Manĉestro, jam havas bonajn fabrikojn, kie oni fabrikas bonkvalitajn lanajn ŝtofojn; tamen en urboj la bulgaroj prefere aĉetas ŝtofojn, markitajn kiel anglaj.

Bulgaraj vilaĝaninoj

estas modelaj laborantoj. En preskaŭ ĉiu vilaĝa domo estas trovebla negranda teksmaŝino el ligno, per kiu la virino teksas bonegan fortikan tolon el lino, kiun ŝi mem kulturas, sekigas, purigas kaj ŝpinas. Neniam iliaj manoj estas ripozantaj. Ili kulturas silkajn vermojn, ŝpinas fadenojn kaj teksas la plej delikatajn silkajn ŝtofojn. Ili ŝpinas fadenojn el lano, el kotono, kaj faras ŝtofojn por kostumoj de la tuta familio.

Ĉiu vilaĝo havas apartan fasonon de vestaĵo. La kunmeto de koloroj kaj desegnoj estas ĉarma. Viraj kaj virinaj vestaĵoj estas belege broditaj, kaj eĉ ŝtrumpoj havas desegnaĵojn de rozoj kaj floroj. La tapiŝoj, kiujn la virinoj faras, estas famaj en Usono.

Vinberejoj

Preskaŭ ĉiu vilaĝano havas propran vinberejon, kaj dum bona sezono li rikoltas grandan kvanton de tiu bongusta suka frukto. Estas neeble manĝi aŭ vendi la tutan rikolton. Oni faras vinojn, brandojn kaj konfitaĵojn el la vinberoj. Do, ĉiu vilaĝano volas regali vin per vino aŭ brando. Dum speciala tago, "nomtago", konatuloj vizitas siajn amikojn por trinki je ilia sano, kaj la gastiganto havas okazon regali sian vinon.

V a g u l o j.



Faktoj kaj komentoj

La indiferenteco ĉe la Laboristaro

La "Nacia Federacio de la fervojaj laboristoj" organizis kunvenojn en Francio, por elmontri la kulpon de la kompanioj pro la tro oftaj akcidentoj, kiuj kostis la vivon al 60 K-doj dum la 2 lastaj monatoj, por protesti kontraŭ la enkarcerigo de senkulpuloj kaj kontraŭ la maldungo de tro agemaj delegitoj. En Nansi (france: Nancy), urbo kiu entenas proks. 1800 fervojistojn, estis fiksita la kunveno je dimanĉo, 2. aŭg., matene. En la ĉirkaŭaĵo de l' kunvenejo oni vidis policistojn, piede kaj bicikle, policestraron, ĝendarmojn kun militkaskoj kaj pafiloj. Laŭ tiu aspekto la kunveno devus esti impona. Je la 9-a, kiam mi eniras, ĉeestis . . . deko da K-doj. Kiam la oratoro fine komencas paroli je la 10-a, estis 35 ĉeestantoj (inter kiuj supozeble kelkaj civile vestitaj policistoj)! La oratoro komence deklaris, ke li ankaŭ plezure fiŝkaptus aŭ ĉasus dum tiu bela mateno . . .

Mi konsilas al la tiea burĝaro, ne malŝpari monon por senutilaj ĝendarmoj; ĝi povas dormi trankvile. Kun malĝojo mi liveras tiun fakton al la SAT-anaro. Mi pli ŝatus raporti pri iu grandioza manifestacio. Sed se estas ĝojige ekkoni sukceson aŭ vekiĝon de la laborista klaso en iu loko, bone ankaŭ estas koni la mankojn aŭ fiaskojn en aliaj. (9618)[1]

La kolor-linio kaj dio

La blankulo en Suda Afriko ankoraŭ subpremas la koloran enlandulon. Ĉi tiu ne rajtas sin organizi nek striki. La metioj estas monopolo por la blanka laboristo. La kolorulo en la grandaj urboj nun ekpovas promeni sur la trotuaro, ĉar aliel li malhelpus la aŭtomobil-iradon en la ŝoseo. Ĝenerale en la nordaj distriktoj la koloruloj devas veturi en specialaj tramoj kaj loĝi en apartaj malbonaj kvartaloj. Kvankam laŭ teorio dio estas patro de ĉiuj homoj, la eklezio ne permesas, ke la kolorulo vizitu blankulan preĝejon, eĉ en aparta horo. Sen speciala permeso de sia dunginto la kolorulo ne povas esti en la strato post la 21.30-a h.

Pri tiaj faktoj kaj aliaj, kiuj koncernas eksterlandajn aferojn, plene silentas la instruisto en la brita lernejo, kiam li pritraktas la gloron kaj benon de la Brita Imperio. (488)

[1] R e d. n o t o. — Nia K-do 9618 tute pravas, sendante al ni tiun raporton, kvankam ĝi estas malkuraĝiga. Sed "S-ulo" devas raporti nepre la veron. Ni ne iru blinde kaj kun danĝeraj iluzioj tra la okazantaĵoj. Ni vidu klare kaj objektive, ne perdante vojon kaj celon el okuloj.

Revuo de semajno el la 19-a horzono (Usono)

Huver[1] akceptas

Kandidato por prezidanteco kutime prezentas sian akcepto-program-paroladon. La respublikano Huver faris tion dum lasta semajno. Kion la mondo atendu? Estas plej grave scii, kion la kandidato "por la plej alta ofico en la mondo" (tiel diris la nuna prezidanto) rekomendas rilate al la tarifpolitiko, ĉar ĝis ia grado la tutmonda bonstato dependas de tiu politiko. Nu, respublikano tute ne proponas ŝanĝojn. Kuliĝ[2]-politiko daŭros pli severigote. La frazoj de Huver, klarigite, diras jenon: Fremdaj landoj ne faru kontraŭdirojn, se Usono fermas la limojn kontraŭ iliaj produktoj per siaj protektaj limdepagoj. Se tiuj landoj fremdaj pro usona tarifpolitiko ne povos produktadi kaj ties laboristoj restadas senlaboraj kaj konsekvence estas malhavaj je vivrimedoj, ili levu la nazojn en la ĝenerala direkto al Usono kaj prenu longan ekflaron. Ili tiam flaros la riĉajn nutraĵojn fritatajn sur la amerika fajrujo.

La problemo plektiĝas

Sprita artikolisto, fama en tiu ĉi lando miras prave, ĉu la tarifskemo daŭros efiki, kaj tial demandas: "Se ni limbaras enportojn kaj daŭros prosperi per niaj elportoj, ĝuste kion fremdaj nacioj uzos kiel monon se tempo alvenos por pagi nin?" La ŝulda ŝarĝo de la "cetera" mondo fariĝas pli granda ol montego Everesto, kaj ĝi ne haltas altiĝi. La pikaj rimarkoj certe praviĝas, se oni aŭdas, ke Huver diras: "Usono estas la modelo de espero de la tuta mondo". Eble, ĉar kiam nacio trans la marego malsatiĝos ĝis antaŭ la ekmorto pro la ekonomia sklavservado por Usono, ĝi staras preta sendi menuon de tio, kion ni havis por nia tagmanĝo kaj rakonti al ili, kiom da radio-aparatoj ni posedas kaj en kiom da aŭtomobiloj ni plezurveturas.

Fanfaroni estas la ĉeftono

Fanfaroni estis nedisigebla de procentegulo. Kaj onklo Huver ne povas sin deteni praktiki tiun ĉi noblan arton; tial li distrumpetas: "Niaj laboristoj per siaj mezaj salajroj semajnaj povas nuntempe aĉeti duoble kaj trioble pli da pano kaj butero ol iu ajn salajrakirulo en Eŭropo". Se nenio alia estus necesa ol pano kaj butero, kredeble eĉ multaj eŭropaj laboristoj sufokiĝus pro tromulto, ĉu ne, ŝercemulo?

Kelog-packontrakto kaj Huver-malarmemo

Li energie konstatas, ke: "Ni scias, ke en armita mondo estas nur unu certa garantio por libereco kaj tio estas prepariteco por defendo". Forĝu glavojn el plugiloj, jen la religio de Huver. Imperiestro Vilhelmo estas senpotencigita, vivu Huver, la cezaro de nova estiĝanta mondimperio. La kranioj de militviktimoj en la nun multe vizitataj tranĉeoj sur la iamaj francaj batalejoj grimacaĉe mokridegos al rigardantaj usonanoj, kiujn ili rekonas per siaj sportvestaĵoj.

Huver laŭdas Federacion de Laboro

Laŭdegante, la kandidato amindumas la laboristajn voĉdonontojn. Danke li mencias, ke "la profesi-unia movado de nia lando estas kaj estos fidinda apogilo de amerikaj individualismo kaj institucioj". Li konfesas antaŭ la publiko, ke "ĝi, La Federacio de Laboro, kontraŭstaris ĉiajn instruojn eŭropajn emajn al renverso, kaj ni ŝuldas dankon al ĝi, ke ni restis netuŝitaj de eksterlandaj sociaj kaj ekonomiaj malsanoj". Bedaŭrinde li diras la veron. Sendube, multaj federacianoj voĉdonos por Huver.

[1] Angle: Hoover. [2] Angle: Coolidge.

La sinteno de Federacio de Laboro

La centra plenumkomitato antaŭ nelonge interkonsiliĝis pri "endorsigo" (akcepto de jam proponita kandidato kiel la sia) de unu el la kandidatoj. Estis fortega influo por Smit, la demokrata partikandidato. Sed la malplimulto, kiu ŝajne posedis multajn promesojn de la varbĉefo de Huver, sukcesis malebligi efektivan favoran deklaron je Smit, kaj tial la decido alprenita deklaras: Federacio de Laboro restas neŭtrala kaj lasas la juĝon al siaj membroj.

Laboristaj kandidatoj

Por socialdemokratoj: Norman Thomas, iama predikisto, tre estimata; por socialistoj De Leonaj: Reynolds, droninta ĉe provo savi knabon el rivertorento; nova kandidato nekonata al la kompilinto; Komunista partio: Ŭiljem (William) Foster, tre konata inter la radikalulularo. Pri ĉiuj ĉi kandidatoj Federacio de laboro ne trovis necesa eĉ nur paroleti; nur pri la kapitalistaj kandidatoj okazis interkonsiloj!

Aliaj zorgoj de Federacio de Laboro?

En okcidenta ŝtato Kolorado lastjare la Industriaj Laboristoj de l' Mondo (I.W.W.), revolucia industria organizo, sukcesis gvidi strikon per kiu la ministoj gajnis diversajn notindajn plibonigojn. Depost tiam la laboristoj sekvas la revolucian organizon. Subite la Unuigitaj Minej-Laboristoj, organizo de Amerika Federacio de Laboro, kiu estas je la rando de kompleta detruiĝo en multaj ŝtatoj, ne sendas agentojn en la minacitajn distriktojn, sed speciale al Kolorado, kie nenio danĝeras. Tie ili provas forlogi la laboristojn de la revolucia organizo; cetere sensukcese. Samtempe la Amerika Legio (faŝistoj) ekkomencas publikan atakon je la Industriaj Laboristoj de l' Mondo minacante ĉasi la "ŝanceliĝulojn" ("Wobblies", kromnomo, kiun la revoluciuloj akiris post kiam ili, okaze, kiel ofte, estis batitaj ĝis senkonsciiĝo kaj sen- kaj rekonsciiĝinte "ŝanceliĝis" sur siaj kruroj) perforte el la ŝtato kaj ne tro strange: la gazetoj anoncas la interkonsenton kun la Amerika Federacio de Laboro!

Ankoraŭ ne la viktimoj de la Centralia tragedio estas liberaj, ankaŭ Mune (angle: Mooney) kaj Billings soifas je libero en malliberejo; ĉiuj senkulpaj, jam de longaj jaroj. Ĉu oni celas novajn mortigojn de proletoj, aŭ ĉu oni volas malhelpi la energian kampanion[1] por liberigo de la vivante-enterigitoj? Ambaŭ celoj estas noblaj por ambaŭ ne tro malsamaj batalkunuloj. Tiel ni eniras la funebran semajnon, kiam ni respektege rememoros pri du heroaj mortigitoj — Sakko kaj Vanzetti! INO-KOR. (1307)

[1] Agitado.

EL LA HISTORIO DE L' SOCIALISMO

4. Prudon kaj la Mutualismo

Prudon' (france: Proudhon), fondinto de la mutualista doktrino, difinas tiele la socian problemon: "Estas donitaj la homo, la familio, la socio, estaĵo kolektiva, seksa kaj individua, dotita je rezono, konscienco kaj amo, kies destino estas instruiĝi per la sperto, perfektigi sin per la pripensado, kaj krei sian substancon per la laboro; necesas organizi la povojn de tiu ĉi estaĵo tiele, ke ĝi restu daŭre en paco kun si mem kaj ke ĝi tiru el la naturo, kiu estas donita al ĝi, la kiel eble plej grandan sumon da feliĉo". Por tiu ĉi problemo la mutualismo serĉas la solvon en anstataŭigo per la ekonomia kaj industria reĝimoj anstataŭ sistemo de socia ordo bazita sur la principo de aŭtoritato. "Sub industria reĝimo", diras Prudon, "ni komprenas ne formon de registaro, kie la homoj, allasataj al laboroj de terkulturo kaj de industrio, entreprenistoj, posedantoj, laboristoj, fariĝus siavice reganta klaso, kiel iam la nobelaro kaj la pastraro, sed kunmetiĝon de la socio, kiu havas kiel bazon, anstataŭ la hierarkio de l' politikaj potencoj, la organizon de l' ekonomiaj fortoj."



La mutualismo proponas funkciigi tiun organizon de l' ekonomiaj fortoj 1. per likvido de l' publika kaj de l' personaj ŝuldoj; 2. per kreo de kompanioj aŭ asocioj laboristaj starigotaj laŭ la principoj de individuaj kontraktoj kaj ligotaj inter si per socia kontrakto; 3. per la leĝa normigo de l' Valoro; 4. per la universaligo de l' propraĵoj; 5. per organizo de reciproka ("mutuala") kredito; 6. per interŝanĝo de produktoj kontraŭ produktoj. Definitive, Prudon kontraŭstarigas al la ekonomiistoj, kiuj defendas la individuan propraĵon kaj la kapitalisman reĝimon, la principon de l' universaligo de la propraĵo kaj la neo de l' produkteca renta kapitalo; al la socialistoj-komunistoj, neantoj de l' privatpropraĵo, li kontraŭstarigas la universaligitan propraĵon kaj la liberan kontrakton. De pozitiva vidpunkto, Prudon restigas la mutualismon en "interŝanĝa leĝo, teorio pri reciprokeco ('mutualeco'), sistemo de garantioj, kiu solvu la malnovajn formojn de niaj civilaj kaj komercaj socioj, kaj kontentigu ĉiujn kondiĉojn de efikeco kaj justeco".

Li skribas: "La homo havas la kapablon konscii sian indecon en la persono de sia similulo, kiel en sia propra persono, kaj aserti sub tiu ĉi rilato sian identecon kun li. La justeco estas la produkto de tiu ĉi kapablo . . . Ĝi estas egala (adekvata) al la perfekta feliĉeco, principo kaj celo de la homa destino. La justeco estas la Rajto kaj la Devo. La Rajto estas por ĉiu la kapablo postuli de aliuj la respekton je la homa indeco en sia persono; la Devo, la devigo por ĉiu respekti tiun ĉi indecon en la aliu. Funde, Rajto kaj Devo estas identaj, dum ili ĉiam estas la esprimo de respekto postulebla aŭ ŝuldata; ili nur diferencas per la objekto, **mi** kaj **vi,** en kiu la indeco estas interakordita."

La mutualisma filozofio kuŝas sur tri bazoj: ateismo, respekto de l' homa indeco, justeco. La Justeco estas por Prudon la fundamenta principo, la esenco de l' humaneco. Teruran bruon kaj koleron kreis lia aforismo: "Propraĵo estas ŝtelo". Oni nomis lin "malestimanto de la socio". Tamen li tute ne estis malcedema kontraŭulo de la propraĵ-principo. Li kontraŭis la leĝecon, la ekzistkialon de l' netransportebla propraĵo. Li neis la leĝecon de kia ajn produktiveco de l' kapitalo, de ĉia komerca profito, ĉiuj formoj, falsintaj, laŭ li, la posed-principon, kaj kiuj ebligas la ŝtelon aŭ uzurpon de malplimulto da civitanoj je kosto de ĉiuj, kontraŭe al la homa indeco, kontraŭe al la justeco. Prudon asertis, ke la kapitalo nek logike nek morale povas produkti renton, kaj kontraŭigante la individuan posedon al la propraĵo, li ekkriis: "La individua posedo estas rajta, la propraĵo estas kontraŭrajta." Sub individua posedo li komprenas la fruktuzon de la konsum-objektoj per la individuo kaj eĉ de konfiditaj al li bienoj (kun la malpermeso nur produktive kapitaligi ilin). Do, Prudon fakte defendante sian posed-teorion, ne leviĝis kontraŭ la alproprigo individua, neata de la komunistoj, kiujn li, male, forte kontraŭbatalis.

Plue, Prudon estis akra ateisto. En la eklezio kaj la dikredo li vidis unu fenomenon de homara dekadenco. Rilate al la rimedoj kaj vojoj por efektivigo de siaj ideoj li kredis necesa kaj neevitebla la revolucion. Tamen li konsentis pri transiraj rimedoj kaj proponis kiel enkondukan rimedon la likvidon de l' publika kaj de l' personaj ŝuldoj. Post tiu paŝo, laŭ lia opinio, la mutualista sistemo funkcios per la libera ludo de l' ekonomiaj fortoj; iom post iom la individua propraĵo, rentproduktanta, malaperos: ni troviĝos en socia epoko de liberaj kontraktoj konstante revokeblaj.

SAT-anoj ne pruntedonu vian Jarlibron al iu ajn. Ĉiam postulu, ke servopetanto montru sian membro-karton. Gardu vin kontraŭ profitemuloj kaj parazitoj!

Agado, vivado kaj buĝeto de esperanto-instruisto

Laŭprofesie mi estis ĝis la jaro 1924/25 instruisto de hebrea kaj juda lingvoj; depost tiu tempo mi jam estas ĝis tiu ĉi momento profesia esperanto-instruisto. En 1924 okazis ekzamenoj por esperanto-instruistoj dum la tutpolia esperanto-kongreso en Varsovio, kie sub la prezido de Leono Zamenhof (frato de L. L. Zamenhof) la ekzamenojn mi bone sukcesis kaj ricevis diplomon de esperanto-instruisto ankoraŭ en Polio, mi komencis praktike instrui kaj propagandi per kaj por esperanto, kvankam ne sendanĝere estis por mi — "Politika suspektindulo" kaj "Mallojalulo"; sed la ideo de sennaciismo, ekflorinta en mi tiutempe, estis tiom forta, tiom konvinka, ke mi aliĝis al SAT, malgraŭ ĉiuj persekutoj, konfiskoj de SAT-literaturo kaj plisuspektigo de mia "Persono" . . .



Tiam mi tuj forlasis la instruadon de juda-hebrea lingvoj, ĉar mi ne volis plu esti i l o en ies manoj por stultigi, ŝovinigi, naciigi ies kapojn, kompreninte jam, ke ĉio "nacia" estas negativa faktoro, kaj per instruado de nacia lingvo mi fariĝas la sama kunhelpanto, kunlaboranto de reakciuloj, konservativuloj kaj aliaj fiuloj . . .

Veninte en 1925 Sovetion, mi dum preskaŭ dujara periodo loĝis en Kremenĉug (Ukrainio), kie mi fondis kelkajn novajn rondetojn esperantistajn en lab. kluboj, lernejoj kaj entreprenoj, ekskluzive instruante tie nian sennaciecan lingvon, pensmanieron kaj agadon. En Kremenĉug profesia esperanto-instruisto mi estis nur unusola, kaj mi estis dece salajrata laŭ la 13-a Ret-tarifo en entreprenoj kaj pohore en la lernejoj mezaj kaj labor-profesiaj.

Veninte en 1927 la 15-an de julio Barnaŭlon (en Siberio), mi tuj komencis, malgraŭ la somera "trankvilo" kaj "malvivo", ĉi tie reginta, "maltrankviligi" kaj "vivigi" ĉiujn unuopajn geesperantistojn ĉi tieajn (sume 1½...) kaj ankaŭ diversajn sociajn kaj kulturajn distriktajn organizojn: "Mopr" (IRH), la kulturfakon de sindikataro, la lernejar-estraron, la junkomunistaron ktp.

Nun mi estas tro ŝarĝita per esperanto-lecionoj en ĉiutage kreskantaj novaj rondetoj klubaj, lernejaj (privatajn lecionojn, kiel hebreajn, same esperantajn mi rifuzas); per esperanta tradukado kaj konsultado en konsultejo de sindikatar-kultur-fako kaj en diversaj organizoj — sociaj, kulturaj kaj partiaj, kiuj min per esperanto "ekspluatas" per siaj postulegoj interligi ilin kun alilandaj organizoj kaj entreprenoj. Certe mi devas iom "kontraŭstari" ilian atakadon-trudemecon, sed fine mi plimoliĝas kaj "peresperant-ligas" ilin . . .

Mi estas fraŭlo 30-jara, sed miaj haroj ne ĉiuj estas malgrizaj, ĉar grandan kvanton da pigmento mi perdis per la senĉesa kelkjara ŝatata de mi esperanta agado, propagandado, SAT-varbado kaj instruado. Ĉio-ĉi jam min morale povus rekompenci, satigi eĉ (certe pro tio mi neniam laciĝas eĉ dum 10—15-hora labortago, "libervola", kompreneble . . .), sed ja ne povas ekzisti homo dum nia epoko sen materia bazo ankoraŭ, do mi ankaŭ priskribos al vi, kiel mi n e m a l s a t a s, n e f r o s t m o r t a s, n e m a l k u l t u r i ĝ a s k a j n e s o v a ĝ i ĝ a s en tiu ĉi fabele klimatsaniga, kultura — certe, multaj eĉ ekmirus — homeca "blankursa" lando Siberio kaj aparte tiu ĉi okcidenta parto, kie mi loĝas.

Kiel vi vidas sur mia foto, mi absolute ne aspektas malsana, malvigla, malenergia kaj . . . malsata, ĉar mia buĝeto estas sufiĉa preskaŭ dum tuta jaro, kvankam mi instruas nur 8—9 monatojn jare; aliajn 3 monatojn mi utiligas por vizitado de miaj plej karaj geamikoj en Sovetio, kaj nunjare mi ilin utiligos por nia VIII-a en Göteborg ĉe miaj svediaj amikoj[1].

Tago mia komenciĝas ne pli-malpli frue, ol je 6.30 h., kaj finiĝas je 23 ĝis 24-a nokte; dormas mi regule 6—6½ horojn, ne pli, kaj tio fariĝis por mi jam leĝo-kutimo. La sama leĝo-kutimo regas mian gimnastikadon, korp-banadon, ekzercadon, skiadon ktp. Je 6.30 h. matene mi jam estas ellitiĝinta, demetinta mian tolaĵon kaj gimnastikanta dum 20—30 min. en speciala kuvĉambro; post gimnastik-manipulado mi banas tutnudan mian korpon dum 5 ĝis 10 min.; poste mi denove faras diversajn liber-ekzercojn sport-gimnastikajn, ĉion ripetante ĉiutage samregule, samtempe kaj sammezure.

Ĝis la 8-a horo mi jam estas plenvestita kaj tetrinkinta. Nur matene mi trinkas teon, tage kaj vespere nur lakton kun "Tolokno" — stupaĵo — avenfaruno, miksita kun cedronuksoj, produkto satiga, grasiga kaj fortiga siberia, kiun mi dekkilograme konsumas . . .

De la 8-a ĝis 10—11-a h. mi ĉiumatene violon-ludas, ĉar mi vizitas la lokan muziklernejon, kie mi 1—2-foje sabate jam memstare publike prezentas koncerte-etude miajn sciojn. Poste mi jam foriras "prilaboradi" la lokajn sociajn, partiajn kaj kulturajn organizojn, kiujn necesas nepre vizitadi ĉiutage, por puŝi, veki kaj konsciigi ilin pri nia grava peresperanta afero. Mi sendigas salut-leterojn, telegramojn, invitleterojn ktp. dum diversaj solenaj vesperoj, aranĝataj de l' urbestraro kaj societaro, oni min regule jam invitas por laŭtlegi la salutleterojn eksterlandajn, ricevitajn pere de mi, aŭ per nia esperanto-konsultejo (dum oktobra festo kaj festo de ruĝarmeanoj mi la samon faris, kaj estis por nia afero granda sukceso kaj propagando).

Je la 14—15-a h. mi tagmanĝas en la loka kooperativa manĝejo, kie por mi speciale oni pretigas vegetaran manĝaĵon, por kiu mi pagas monate 12 rublojn (6 dolarojn). Tagmanĝinte, mi jam rapidas al miaj tagaj lecionoj en lernejoj, ĝis la 18—19-a h., kaj de la 19-a ĝis 22—23-a mi instruas en niaj labor-kluboj kaj entreprenoj; la sama ordo ripetiĝas ĉiutage, ekskluzive la lundoj, kiam mi absolute ne instruas, kaj dimanĉoj, kie ĝis la 12-a mi pasigas la tempon en muziklernejo kaj de 12-a ĝis 17-a en esperanto-konsultejo de profsindikataro, kie mi konsultas kaj laŭtlegas al la kunvenintaj Gek-doj. Tre malofte mi vizitas la lokajn teatrojn kaj kinojn, ĉar ja vespere mi estas okupata per la lecionoj; sed estetikan mankon mi rekompencas per la riĉa biblioteko kaj per ŝak-ludado pasia.

Mia meza monata salajro estas 80 ĝis 90 rubloj. Estis monatoj, kiam mi perlaboris eĉ 130—150 rbl. nur, kompreneble, p e r e s p e r a n t o - i n s t r u a d o . . . Kaj mia meza elspezo ne superas pli ol 50—60 rublojn monate; do ĉiam mi tenas rezervon por eventualaj elspezoj kaj por kongresvizito; tiel mi pasintjare ankaŭ ŝparis la monon, sed oni malpermesis al sovetianoj enveturi Francion; do . . . la mono restis por aliaj aferoj . . .

Jen estas indekso de miaj monataj elspezoj (meze):

1. Ĉambro-luado kun hejto, lumo kaj aliaj akcesoraĵoj . . . (mia ĉambro estas alta, suna kaj pura) . . .	10 rbl.
2. Tagmanĝo kostas al mi monate .	12 „
3. Matenmanĝo kaj vespermanĝo (lakto, "toloknó", mielo, sukero, butero, pano kaj aliaĵoj)	13 „
4. Lernokostoj en muziklernejo . .	6 „
5. Kostoj de tolaĵlavo, banej-vizito, razado, ĉambro-ordigo ktp. . .	5 „
6. Kostoj de gazetaro	4 „
7. Kotizoj al SAT, SEU, profsindikato, "Mopr" kaj aliaj libervolaj societoj	3 „
8. Korespondad-kostoj kaj libroj . .	5 „
Sume	58 rbl.

Ĉe 80-rubla enspezo restas rezervataj meze dudek du rubloj monate.

Barnaul, Sovet-Siberio.

Ŝ. G o l d f e d e r, "Esperanto", SAT 5448.

[1] Niascie, K-do G. ne ĉeestis en Göteborg. — R e d.

TRA ESPERANTIO

INTER NI

"Lernu esperanton! Lernu tiun logikan, racian, mirinde belan lingvon! Ĝi helpos al vi dum vojaĝoj: en ĉiuj urboj de l' mondo ja troviĝas esperantistoj. Ili estas bonkoraj, helpemaj, ĉiam pretaj servi al samideanoj . . ."

Tiele parolante, propagandistoj miksas veron kaj neveron; ili blufas iomete. Fakto estas, ke ĉe vojaĝoficejo, ĉe hotelo, banko, restoracio aŭ stacidomo oni pli ofte trovas personojn, kiuj parolas ĉu angle, ĉu germane, ĉu france. Sekve, turistoj ne multe profitas je la scio de esperanto. Alparolante hoteliston en nia lingvo, vi nur ekvidas mirigitan mienon de homo, kiu sin demandas ĉu li aŭdas grekan, rumanan aŭ eble tataran lingvon . . .

Kiu celas nur akiri lingvan helpon dum vojaĝado, tiu lernu prefere la lingvon de iu granda imperialista ŝtato.

Sed vero estas, ke la grandega plimulto da homoj, kiuj povas doni informojn pri la prezo de ŝambro, pri la veturtempo de vagonaro aŭ pri manĝaĵoj, tute ne kapablas diskuti ian socipolitikan temon en la de ili "sciata" fremda lingvo. Se tiaj "poliglotoj" devus paroli dum kongreso en la lingvo per kiu ili donas informojn al turistoj, ili estus treege embarasataj. Tion necesas ne malatenti.

Dume jam okfoje la SAT-kongresoj montris, ke simplaj laboristoj povas tre bone diskuti pri plej diversaj temoj en la de Zamenhof artefarita lingvo.

Ne domaĝas por la laborista movado, ĉu kelneroj en luksaj restoracioj, ĉu oficistoj en turistoficejoj, en bankoj aŭ similaj kapitalistaj entreprenoj ne konas esperanton. Tio nur pruvas, ke la gvidantoj de la neŭtrala esperanta movado ne bone plenumis sian taskon. Eble la pli saĝaj iam komprenos, ke estus pli trafe paroli iom malpli ofte kaj patose pri la "interna ideo" de esperanto kaj pli diligente, metode kaj bontaktike klopodi por enkonduki nian lingvon en la neŭtralaj t. e. kapitalistaj rondoj. Kiam la neŭtraluloj tion faros sukcese, mi tiam volonte ekkrios: Vivu la neŭtralismo!

Dume ni fosadu profunde nian propran laboristan sulkon . . .

Kopenhago, 5. 9. 28. E. L.

N. LENIN:
Ŝtato kaj Revolucio
150 paĝoj, formato 12×18 cm. Prezo 1 mk. g.
Mendu tuj ĉe la Administracio de SAT
R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27

Prilingvaj konsideroj

Oni skribas al ni: "Kiel abonanto de "S-ulo" mi legas la alvokojn viajn pri kunlaboro per konsiloj, sugestoj — por la plej prospera sukcesigo de la vortaro, prirevata kaj sopirata ankaŭ de mi. Kaj tial mi turnas min al vi per du rimarkoj, pri du demandoj, kies solvon ne kuraĝas entrepreni la neŭtrala gazetaro, kies porĉiaman solvon mi tamen ŝatus ĝisvivi.

Unue mi priploras la ekstermadon, komencitan verŝajne de okcidenteŭropaj esperantistoj, la ekstermadon de la tute senkulpa litero **ĥ,** kiu abundas en slavaj idiomoj, sed precipe svarmas en aziaj lingvoj. Ĉi tiun literon, kiel sian parencon, ĝoje salutas ĉiu aziano, se li ĝin renkontas en: ĥano, ĥaoso, ĥemio, ĥimero, ĥirurgio, ĥolero, ĥoro, anarĥisto. Sed lastatempe mi rimarkas, ke oni komencas persekuti la literon **ĥ**, skribante kaoso, kemio, kirurgio, anarkisto. Jam esperanto estas senescepte eŭropa lingvo; almenaŭ tiun bagatelon oni ne devus ŝanĝi, tiom da afableco la okcidentaj esperantistoj montru al siaj orientaj K-doj. Diverse oni pretekstas ekstermante la literon **ĥ**. Jen ĝi maloportuna estas por eŭropa lango, jen la presejoj ne havas la literon **ĥ**.

La dua demando estas tiu, kiu jam iom post iom solviĝi komencas sur la paĝoj de "S-ulo". — Estas la transskribo de propraj kaj geografiaj nomoj. Ĉiu scias, ke esperanto estas fonetika lingvo, kaj pro tio geografiaj kaj propraj nomoj povas kaj rajtas esti skribataj en esperanta teksto n u r fonetike. Se oni por la rekonebleco de la nomoj deziras apudmeti la nomon laŭ la nacia ortografio, tio povas kaj rajtas okazi n u r e n k r a m p o j. Oni ja devas kompreni, ke ofte esperantoteksto estas laŭtlegata al aŭskultantoj. Do bona efekto riceviĝas dum laŭtlegado de francaj kaj anglaj geografiaj kaj propraj nomoj! Aŭ eble ĉiuj esperantistoj en la mondo estas francoj, angloj aŭ germanoj? Ne estas necesa tiam la internacia lingvo esperanto, se la tuta mondo konsistas sole nur el francoj kaj angloj, se ekzistas neniaj plu nacilingvoj.

Sed, se estas vero, ke en la mondo estas ĉ. 983 lingvoj kaj proksimume 5000 dialektoj, ĉu tiuokaze ne estas malnoble, malĝentile — trudi al la tuthomaro siajn fuŝ-ortografiojn, ekzemple al esperantistoj, baltaj popoloj kaj kelkaj slavaj nacioj (ekz. serbo-ĥorvatoj), kies naciaj ortografioj estas severe fonetikaj, la lasta vorto de la scienco pri fonetiko? Ĉu do ĉiu nefranco, neanglo — por esperantistiĝi — nepre, severe devige — devas ellerni francan, anglan k. a. ortografiojn — por povi ĝuste kaj precize tralegi esperantan tekston?

Miaopinie, estas nepra devo de ĝentileco de ĉiu esperantisto, kies nacilingvo estas nefonetika, skribi esperantlingve la nomojn, devenantajn el lia nacilingvo, apudmetante en krampoj la nacian skribmanieron. Landnomoj jam senescepte ĉiuj esperantiĝis; esperantiĝis ankaŭ multaj urbnomoj, kiel Londono, Novjorko, Berlino, Parizo, Moskvo, Rigo, Marsejlo, Bulonjo, Kolonjo. Plejparte nur famili- kaj antaŭnomoj bezonas la apudmetadon en krampoj, eĉ ne ĉiuj familinomoj. Ekzemple: Ŝekspir, Tolstoj, Ŝiler, Rajnis, Senkeviĉ kaj multaj aliaj estas komprenataj sen klarigo. Sur la titolpaĝo de la eldonota vortaro certe notita estos la preseja urbo — mi ĝin ŝatus tralegi, sen antaŭa ellerno de la koncerna nacilingvo.

E d g a r o G r o t.

Red. noto. Ni povas plene konsenti kun la vidpunkto de nia K-do, kaj de kelka tempo jam ni praktikas la esperantigon de ĉiuj propraj nomoj en "S-ulo", metante la nacian ortografion nur en krampoj. Kompreneble ne ĉiam facila estas tiu laboro por ni, ĉar niaj korespondantoj ankoraŭ ne kutimiĝis grandparte, indiki al ni la elparol-manieron. Tio estas afero de eduko. Sed ni esperas, ke post nelonga tempo ĉiu SAT-ano aplikos tiun principon, imitante la ekzemplon de sia gazeto.

Ni atentigas lasthore ankoraŭfoje, ke la 30. sept. definitive finiĝas la specialaj favorkondiĉoj konsentitaj al antaŭmendantoj de nia Plena Vortaro. Prezo: 1 ekz. 7 mk. g., 3 ekz. 14 mk. g. Nenia plilongigo de la limtempo!

FAKA KUNVENO DE VIRINOJ

dum la VIII-a SAT-kongreso en Göteborg la 17-an de aŭgusto 1928

Partoprenis 15 K-dinoj el 4 landoj. La kunvenon malfermis K-dino E. Adamson, proponante elekti prezidanton k sekretarion de la kunveno. Estis elektataj: prezidanto — Elma Adamson (Göteborg), sekretario — Helmi Dresen (Tallinn). Post detala diskutado la kunveno decidis akcepti jenan rezolucion pri la taskoj de virinoj-SAT-aninoj: Apud la ĝeneralaj taskoj de SAT, plenumotaj de ĉiu SAT-ano, estas kelkaj taskoj, speciale gravaj k speciale atentendaj por la SAT-aninoj. La unua konferenco de SAT-aninoj, kunveninta en Göteborg la 17. VIII. 1928, konsiderante tion, starigis jenajn specialajn celojn, kiujn akceli k realigi estas devo de ĉiu konscia SAT-anino: a) Zorgi pri kreo de speciala virina sekcio ĉe SAT kun speciale organizita centro, specialaj fakkunsidoj dum ĉiujaraj SAT-kongresoj k kun speciala paĝo en "S-ulo". b) Laŭeble en la

interrilatado kun SAT-aninoj diverslandaj k per ilia helpo propagandi al la Laboristaro tutmonda la ideojn pri starigo de sistemo de laborprotektado k salajrado, komuna por la laboristoj k laboristinoj, per helpo de "S-ulo" diskonigadi ĉiujn progresojn, atingitajn tiurilate. c) Ĉar la nova mondmilito preparata de la kapitalistaj potencoj, plej krude trafos la laboristan movadon k la laboristajn amasojn diverslandajn — zorgi, ke la patrinoj, edzinoj k fratinoj laboristaj de la tutmondo plej bone ekkonsciu pri la danĝero de tiu milito k influu siajn edzojn, filojn k fratojn — plej energie kontraŭstari al ĉiu provo ĵeti ilin en la novan militon, celantan la intereson de kapitalismo k imperialismo.

En la centron, kiu provizore zorgos pri la efektivigo de fondo de virina sekcio ĉe SAT, estis elektata K-dino Elma Adamson, Göteborg, Svedio, Box 73. La K-dinoj reciproke informis sin pri la stato de la virina vivo k laborkondiĉoj en la div. landoj.

Prez. E. Adamson. Sekret. H. Dresen.

AL KELKAJ KORESPONDANTOJ

Post sepsemajna foresto mi trovis hejme ĉe mia reveno abundan korespondaĵon kaj legotaĵon. Ĉion laŭpove mi prizorgos. Almenaŭ ĉiu estu certa, ke nenion gravan mi malatentas. — 10-IX-28. E. L.

LABKORECO[1]

Jam delonge atendas la demando pri pli bona kvalito de korespondaĵoj. Preskaŭ la duono da korespondantoj ĝis nun ne sufiĉe atentas ĝian gravecon. Mem korespondanto kaj nur tre malgranda grupeto el liaj konatuloj scias pri ĝi. Bona afero estas havi alilandajn amikojn, estas agrable korespondadi ktp. Sed ne tiel la Proletaro devas apliki la korespondadon. Por SAT-anoj ĉiu letero, ĉiu esperantaĵo devas esti unu el iloj de propagando, ilo akra kaj malproksimen pafanta — per ĝi oni povas venki amasojn. Tial oni devas forlasi simplan korespondon, kaj oni devas pensi pri "laboreco". Devas esti forĵetataj vanaj ĝeneralaj pridiskutoj, devas esti forĵetataj por nenio taŭgaj frazoj pri vetero ktp. Ĉiu korespondanta SAT-ano estu "labkoro". Neniaj paroladoj, artikolegoj, propagando efikos tiom, kiom malgranda fakteto, kiu estas priskribita en letero de alilanda K-do. La letero — labkoraĵo — devas esti viva konkreta materialo, donita de klasa K-do; en ĝi oni devas doni faktojn pri nia vivo, vivkondiĉoj, gravaj okazoj en laborista vivo, pri strikoj, venkoj, malsukcesoj, batalo ktp. Malmulte signifas diri, ke ni batalas por niaj rajtoj — montru, kiele vi tion faras, fakte, konkrete. Labkoraĵoj devas esti legindaj por amaso da laborularo. Jam estas tempo por la scipovantoj utiligi tian gravegan ilon por pliproksimigi la tutmondan Laboristaron. Tio vere venkigos nian lingvan movadon. Neniu letero devas resti en manoj nur de la ricevinto. Oni devas kopii ilin, disdonadi, laŭtlegi dum kunvenoj, apliki en gazetaro, murgazetoj, enmeti flugfoliojn, ĉie utiligi.

Se ĉiu laborist-korespondanto tutplene eluzas ricevitan leteron, tiam unu letero rezultigos dekon da novaj amikoj de nia movado; ĝi kreos novajn esperantistojn. La devizo: SAT-labkoreco ĉie kaj ĉiam! devas esti akceptata kaj aplikata de ĉiu SAT-ano por la bono de nia movado.

Paŭlo Tilin (9310), Leningrado.

[1] Movado de laborist-korespondantoj. Red.

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

NEDERLANDO. 26. 8. kunvenis en Hago la Ĝenerala Nederl. Federacio de Lab Esp-istoj. Delegitoj el div. lokoj prezentis siajn sekciojn. La kongreso pritraktis i. a. rilatojn inter SAT k la Federacio. Jena rezolucio estis akceptata:

"La kongreso konfirmas la vidpunkton de la Feder. estraro, ke la organiz-metodo devas esti: 1. lokaj unuiĝoj, 2. naciaj unuiĝoj, 3. internaciaj unuiĝoj (SAT). — Aŭdinte la raporton de la federacia estraro pri la korespondado inter NFLE k SAT; fidante, ke la federacia estraro en tiu korespondado estis gvidata de la principoj pri unueco de la laboristaj esp-istoj ne sole en nia lando, sed en la tuta mondo; samopiniante, ke por atingi tiun tutmondan unuecon estas necese, ke ekzistu antaŭ ĉio unueco inter la laboristaj esp-istoj de propra lando; tute substrekas la instigojn de la federacia estraro, kiu memorigis en la korespondado kun la Ekzekutiva Komitato de SAT la nederlandajn SAT-anojn pri ilia devo: aliĝi al la landa federacio de lab. esp-istoj; k opinias, ke bona aranĝo de la rilatoj inter NFLE k SAT nur estos ebla, kiam ĉiuj laboristaj esp-istoj estos organizataj en la Nederl. Federacio de Lab. Esp-istoj; pro kio ĝi ŝarĝas la estraron de NFLE daŭrigi en tiun direkton la korespondadon por ke fine estu aranĝata la bona rilato inter la organizoj de Lab. Esp-istoj."

Multaj proponoj estis traktataj k div. artikoloj de la statuto aranĝataj. La sekv. kongreso okazos laŭeble en Utrecht (aliokaze en Amsterdamo. — W. A. v. B. (8351). — **SOVETIO.** Laŭ ukrainia ĵurnalo "Proletarij" organiziĝis 23. 8. Komitaton por intern. interligo en Ĥarkov. Krom multaj aliaj organizoj ankaŭ la esp-istoj eniris ĝin. Unu el la unuaj taskoj estas inviti laborist. delegitarojn el div. landoj por partopreni la solenon de l' XI-a datreveno de la Okt. Revolucio. — Gulin (6123).

Envojaĝ-malpermeso Usonon por konata SAT-K-do

Al nia K-do M. Starr (488), Londono, kiu volis pasigi pli longan tempon en Usono por partopreni la eduktemajn lekciojn ĉe Brukvud-Labor-Kolegio, la usona registaro rifuzis la vizon.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Labour Woman (laboristino), Londono, sept., Virina mov. en Ĉinio (198).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Daily Herald, Lond., 31. 8., Accion Cooperatista, Barcel., 31. 8., Travail (laboro), Lyon, 1. 9., Le Rail Electrique (fervoj. gaz.,) Juvisy, sept., Programo de intern. kunveno en Arnhem, 26. 8.

Pri "S-ulo" (recenzoj):

Vegetarano, julio, La Socialisto, Vieno, sept.

Pri SAT-Vortaro:

La Socialisto, Vieno, sept.

Pri SAT-Kongreso:

Leipz. Volksztg., Leipzig, 27. 8., Freie Sportwoche, Leipzig, 27. 8., Prolet. Frouw (Prol. virino), Amsterd., 29. 8. (virina fakkuns.), Upsala, 30. 8. (parolado de Lanti pri SAT kun portreto), Signalen, Stokholmo, 30. 8.

Peresperantajn let. k artik. presis:

Travail (laboro), Lyon, 1. 9., Sächs. Arb.-Ztg., Leipz., 1. 9. (junular-aldono, Ĉita), Die Einheit (Unueco), Berlin, 2. 9.

Noto: La Socialista Sport-Internacio Laborista dissendis la raporton pri la SAT-kongreso al 280 germaniaj lab. gazetoj k al 46 eksterlandaj (germanlingve k esp-e).

34-jara laboristo (progesinta en esperanto) deziras koresp. kun eksterlandaj K-dinoj, eventuala geedziĝo. Adreso: Stefan Wizsy, L. h. 2/45, **Niklasdorf a. M.,** Stirio (Aŭstrio).

ATENTU!

K-dino Mary Mc. Carthy (7373), bedaŭras, ke ŝi dum kelka tempo ne povas respondi al koresp-antoj pro malsaneco.

ATENTU!

Manchester Esperanto Klubo intencas aranĝi esp. ekspozicion 13. okt. ĉe Duke St. La SAT-anoj estas petataj sendi al ni ekspoziciaĵojn, esp-aĵojn kaj propagand-materialon.

Adresu al: K-dino M. Dunn, 114 Duke St. Hulme, **Manchester** (Anglio).

La multkoloraj, ilustritaj poŝtkartoj de SAT

estas unika provo, bilde esprimi nian idealon. En la korespondado kun varbotoj tiuj kartoj estos tre utilaj al vi. Tial aĉetu ilin ĉe la **Administrejo de SAT,** R. Lerchner, Colmstr. 1, **Leipzig O 27.** La kompleta serio, konsistanta el 5 diversaj kartoj, kostas **0,50** g. mk.

Radio-amatoroj!

Radio Buro de ĥarkova Distrikta Soveto de Profsindikatoj organizas korespondadon por radio-amatoroj.

Ĥarkova radio-amatoro atendas vian leteron.

Adreso: R. S. S. R., **Ĥarkov,** Dvorec Truda kv. 63, Radio Buro.

Al tutmonda Laboristaro!

Esperantista fako ĉe distrikta komitato de Internacia Ruĝa Helpo serĉas korespondantojn pri diversaj temoj, kaj ĉefe pri la vivo de politikaj enkarcerigitoj. Kune kun la respondo estos sendataj afiŝoj kaj nacilingvaj gazetoj. Adresu al K-do Ivanov, **Krivoj Rog,** poŝtkesto n-o 747 (Sovetio).

NIA POŜTO

1162. — Ni prikonsideros vian let. Laŭ mia opinio "L. L." devas doni perfektigan materialon en vigla formo, sed ne sekajn instruaĵojn kiel ekz. prilingvajn traktojn. Kion ĉefe bezonas lernanto post fino de gramatika studo, post kurso, estas multe da legado, por amikiĝi kun spirito k stilo de la lingvo.

6123. — SAT-peranto estas elektata en kunveno de ĉiuj lokaj SAT-anoj, al kiu oni speciale devas inviti ĉiun membron.

1307. — Dum via artik. estas pretigata por la kompostistoj, K-do Lanti ankoraŭ ne revenis al la Red. Certe, mi opinias tre taŭge, prezenti en formo de ĉapitretoj pli longajn artik.

Blazonulo. — Antaŭ la via ni jam ricevis k enpresis similan artik.; ni bedaŭrinde ne havas sufiĉe da loko, por enpresi du art. pri la sama afero.

Dua laboro. — Trovos okaze lokon en "S-ulo". N. B.

4030. Ni bone ricevis viajn 14/- ŝil. Adm.

5296. — Laŭ ripetitaj deziresprimoj unuanime akceptitaj dum SAT-kongresoj la anoj de SAT estas m o r a l e devigataj esti LEA-anoj. Estas al ni tute egale ĉu vi sendas vian aliĝ-monon per iu aŭ aliu SAT-agentejo. La adreso de nia Ukrainia agentejo estas: Dom Sojuzov, Kremenĉug. E. L.

Korektu en n-o 205, pĝ. 398, 2-a kol., 5-a linio de supre: **la** sindikatoficisto (anst. **al**); pĝ. 395, 3-a kol., 12-a linio de supre: not-in**da** (anst. notinde).

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

AŬSTRALIO

K-do L. M. Glynn, Harold Str. T o w n s v i l l e Queensland, dez. koresp. pri fotografiado k a temoj kĉl. L, PK, PI.

AŬSTRIO

K-do Ferd. Steinhofer, Mandlgasse, 104, H i r t e n b e r g, dez. koresp. kĉl, precipe kun Usono. Certe resp.

ĈEĤOSLOVAKIO

Adresŝanĝo. — Jarko Hošek, "Svépomoc" Z l i n (anst. Hodonin Horni plesova 3), Moravio.

GERMANIO

K-do Wilhelm Rottig, Goethestr. 20/1, S c h i l d e s c h e - B i e l e f e l d, dez. koresp. pri div. temoj.

K-do Max Herold, Wartenburgstr. 14, L e i p z i g N 26, dez. interŝ. PM, n u r kun sovetiaj Gek-doj. Certe resp.

K-do G. Nitzsche (tipograf.), Zwickauer Str. 152, C h e m n i t z i. Sa., dez. koresp. kun samprofesianoj pri fakaj demandoj, interŝ. presaĵojn.

K-do Fedor Bayer, Rathausplatz 6, Z i t t a u i. Sa., dez. koresp. kĉl PI. Resp. certe.

K-do Oskar Grimm, Fellbacher Str. 46, S t u t t g a r t - U n t e r t ü r k h e i m, dez. koresp. k interŝ. fotojn kun fotoamatoroj ĉl. Precipe kun naturamikoj.

K-do Karl Stang, Rödelheimer Str. 2/2, F r a n k f u r t a. M., dez. koresp. kĉl.

K-do Kurt Nissen, Sophienstr. 21, p., F r a n k f u r t a. M., dez. koresp. kĉl.

K-do W. Adam, Strehlener Str. 16/4, D r e s d e n - A. 24, dez. koresp. kĉl. Resp. garantiata.

K-do Max Wetzel, Theaterstr. 23, G l a u c h a u i. Sa., dez. fruktedonan koresp-adon kun ĵurnalistoj k spertaj esp-istoj el ĉl.

HUNGARIO

— Al ĉ. Gek-doj, kiuj skribis al mi, per ĉi-anonco mi esprimas mian dankon k petas pardonon, ĉar ricevinte tro multajn koresp-aĵojn mi ne kapablas ĉiujn respondi. — Saluton al ĉiu A. Pétermann.

JUGOSLAVIO

K-do Ĉirilo Gorgeviĉ (ŝuisto), Niška, 7, P r i l e p, dez. koresp. kĉl. pri lab. temoj, precipe kun junul(in)oj, L, PI. Resp. gar.

PORTUGALIO

K-do José Vicente Junior, R. Joaquim Casimiro 2, 4⁰ Esq. ⁰, L i s b o a, dez. koresp. L, PK, PI, PM bfl. kĉl. junaj esp-ist(in)oj.

SOVETIO

K-do Eŭgenio Kirilov, 6 Krasnoarmejskaja, 16, kv. 21, L e n i n g r a d, 5, dez. koresp. kĉl PK, PI.

K-do Teodoro Prjamikov, Aptekarskaja balka, Nr. 36, D n e p r o p e t r o v s k, dez. koresp. pri div. temoj kĉl. Resp. garantiata.

Moskvo 19
UL. FRUNZE, 18
Moskva Komitato de SEU

Ĉiu liberpensulo, IRH-ano, junkomunisto, sportulo, fotoamatoro kaj aliaj fakanoj, sendintaj leteron al supre citita adreso

nepre havos

garantiitan de l' Komitato samfakan korespondanton aŭ peranton laŭdezire.

Neniam prokrastu!

K-dino Mario Simonova (komjunulino), Gluĥova, Krasnaja sloboda, dom imeni Nogina, kv. 10, B o g o r o d s k, Mosk. gub., dez. seriozan koresp-adon kĉl Gek-doj pri junulara, laborista k virina vivo, movadoj ktp. L, PK, PI.

K-do Belogorcev, Ukrainio, N i k o l a e v, Zavod "A. Marti", Esperanto, dez. koresp. kĉl pri politiko, lab. vivo k movado, peras kolekt. koresp-adon. Resp. garantiata.

K-do Papin (ruĝmilitŝipisto), Ukrainio, N i k o l a e v, Sennaja 29 kv. Noskin, dez. koresp. kĉl pri politiko k lab. movado.

K-do Snedov (maŝinisto), Ukrainio, N i k o l a e v, Novoselskaja 6, dez. koresp. kĉl pri lab. vivo k lab. kondiĉoj.

— Ĵurnalistoj, verkistoj, poetoj dez. serioze koresp. kun samprofesiuloj el ĉl. Resp. gar. Adr.: S. Kudrjavickij, Poŝtkesto, 171, "Esperanto-SAT", D n e p r o p e t r o v s k.

Atentu Junularo! Lab. junularo de Serpuĥovo transdonas al junularo tutmonda saluton al Int. tago de la junularo, dez. ricevi salutojn el ĉl. al Int. Tago de junularo. Adr.: Moskva gub., S e r p u ĥ o v o, ul. Krasnij Ugolok 453, al I. M. Korotkov.

— Rajona K-to de junkom. (VLRSM), dez. interligi siajn ĉelojn presistan, kooperativan, komunum-laboristan k a per esp. koresp-ado. Skribu multnombre! Adr.: S e b a s t o p o l, Rajkom VLRSM, Sovetskaja, 2.

K-do Agr. A. Romanjuk, A n d r u s z o w k a, Berdiczewskij okrug, Ukrainio, dez. koresp. pri agrikulturo k a temoj kĉl, gaz., ĵurn., PM. Resp. garantiata.

— Juna K-do E. Kraceviĉ, Ŝaumjana, 10, B a t u m (Kaŭkazo), dez. interŝ. L, PI, PM, kĉl Gek-doj.

SVEDIO

K-do Ivar Kjeltström, Poŝtkesto, 202, K a r l s b o r g, dez. koresp. kĉl esp-aĵoj, L, PI, bfl. Resp. garantiata.

SVISIO

Adresŝanĝo. — K-do Hans Wirz, Kanzleistr. 102, Z ü r i c h - 4 (stratŝanĝo).

TURKIO

— Mi ne dez. komenci novan koresp-adon. Mia nova (necerta) adreso estas: H. Pek, American College, M a r a s c h.

ENHAVO:

	paĝo
Je la memoro de Leo Tolstoj . .	411—12
Hodiaŭ en Bulgario	412—13
Faktoj kaj komentoj	413
Revuo de semajno el la 19-a horzono (Usono)	413—14
El la Historio de l' Socialismo . .	414
Agado, vivado kaj buĝeto de esperanto-instruisto	415
Tra Esperantio	416—18
Anoncoj, Korespondado	417—18

Abontarifo al Sennaciulo: (La unua nombro montras jarabonon por m e m b r o j de SAT, la dua en krampoj montras la jarabonon por n e m e m b r o j. Ni ankaŭ akceptas ¼-jaran abonon.)
Argentino, pes. 5 (6); Aŭstrio, ŝil. 10 (12); Belgio, belgo 10 (12); Brazilio, milrejs. 15 (18); Britio, ŝil. 8 (9); Bulgario, lev. 200 (250); Ĉekoslovakio, kr. 50 (60); Danio, kr. 8 (10); Estonio, kr. 7 (8); Finnlando, mk. 70 (80); Francio, fr. 35 (40); Germanio, mk. 8 (9); Hispanio, pes. 10 (12); Hungario, peng. 8 (10); Italio, lir. 40 (45); Japanio, jen. 4 (5); Jugoslavio, din. 100 (120); Latvio, lat. 8 (10); Litovio, lid. 15 (20); Nederlando, guld. 5 (6); Norvegio, kr. 8 (9); Polio, zlot. 12 (15); Portugalio, esk. 35 (40); Rumanio, lej. 300 (350); Sovetio, rubl. 4 (4,50); Svedio, kr. 8 (9); Svisio, fr. 10 (12); Usono, dol. 2 (2,50). — **Ponumera prezo estas: 0,20 mk. g. = 0,25 fr. svis.**
Pagu prefere per ŝtataj monbiletoj en registrita letero. La germanianoj pagu al poŝtĉeka konto de la Administranto n-o 6835.
La abono validas nur post pago kaj povas komenciĝi kun ĉiu numero.

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)